

Mensuel
Numéro 60
Décembre
2009

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

La SAGO
La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Ni krizkontraŭu !

**Kia socia organizado
por estonteco ?**



**65a kongreso
de
SAT-Amikaro**



**ARMOR
2010**



**3-6an de aprilo
Hiliono**



Speciala prikongresa numero

[http://
kongreso2010.sat-
amikaro.org](http://kongreso2010.sat-amikaro.org)

Flore kuku ! Citrona torto

(ne bretona, tamen bona)

Por 6 aux 8 personoj:

- 1 murbo
- 125 g da sukero
- 100 g da butero fandita
- 3 ovoj
- suko de 2 citronoj

Varmigu la fornon je 200 °C.

Metu la murbon en la torto-pladon.

Miksu kune ovojn kaj sukeron ĝis eta ŝaŭmiĝo; poste aldonu buteron kaj la citronan sukon.

Verŝu la miksaĵon sur la murbon kaj enforngu.

Kuirado daŭras proksimume 30 minutojn.



El nia agendo Pariza Zamenhofa Festo



Escepta koncerto de Jomo

Jomo, fama artisto, koncertos kadre de la Zamenhofa festo organizata de francaj fervojistoj AFCE

sabaton la 12an de decembro de 14a30 ĝis 17a, ĉe 17/19 rue traversière en Parizo

Programo kostas 3€ kaj loterio 2€.

Oni planas festan etoson dank'al tiu talenta artisto.

Z-festi «Kantilie»

En la SAT-Amikara sidejo (134 Bd Vincent-Auriol) ni Z-festos dimanĉon 13an de decembro ekde la 15a kun la parizregiona e-horo «Kantilie».

Antaŭ tio okazos matene je la 10a jarkunveno de la Pariza Grupo de SAT-Amikaro, kiun sekvos komuna tagmanĝo en apuda restoracio.

La Z-tago estas ankaŭ la tago de la esperanto-libroj do kaptu la okazon de via ĉeesto en la libroservo por elekti legindan jarfinan donacon!



La vorto de la OKK-prezidanto Ni krizkontraŭu ! Kia socia organizado por la estonteco ?

Ni volegas prezenti kongreson proksima al niaj kolektivaj nunaj zorgoj.

Krizo havas kaŭzojn bone konatajn kaj devigas nin komenci profundajn tujajn ŝanĝojn.

Sed kiujn?

Tiel ni alpaŝos, kun fakuloj, konkretajn problemojn el nia medio :

- la abelmortado kaj la akvopoluado. Ĝi pridemandas niajn kutimajn agmanierojn pri nia nutro-produktado. Ni bone scias ke ni nepre kontestunian aktualan organizon je la elpaŝo al la naturo, sed kiu elektota vojo ?

Ni spronu niajn pripensojn per :

- debato pri kriza eliro, evoluoj kaj proponoj.

- la dokumenta filmo pri Louis Guilloux «la nesubiĝinto», engaĝita pensisto kaj verkisto. Li konkretigis siajn agadideojn...

Kaj eĉ en la arta programo ni trovos pripensigajn elementojn, tra la tekstoj de Gijomo kaj la verkaĵo de Pablo Neruda (Canto General).

Estu trankvilaj, ni antaŭvidis malstreĉajn momentojn meze de tiuj gravaj debatoj.

Momentoj por spiri kaj eskapi, malkovrante ĉirkaŭaĵon de San Briego, ĝian belan golfeton kaj belan regionon per la tuttagaj proponitaj ekskursoj :

- tiu ĉi oriente de la departemento, kadre de Argoato (*argoa*t bretonlingve = interna parto de Bretonio). Vi malkovros la mezepokan urbon *Dinan* kaj ĝian ĉirkaŭaĵon.

- tiu alia okcidenta ekskurso (vidu malsupre) malkovrigos al vi marbordojn kaj lokajn specialaĵojn.

Kaj evidente kulturajn, amuzajn vesperojn.

Kongreso por pripensi nian estontecon antaŭ ol aliaj homoj pensos ĝin anstataŭ ni.

**Por la OKK
(Organiza Kongresa Komitato),
La prezidanto: Philippe Stride**

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
- & 3 Ni krizkontraŭu !
- 2 Flore Kuku
El nia agendo
BildDeliraĵo: La kastel-nova grupo,10
- 4 Provizora programo
- 4-5 Selle-Humuraĵoj
- 5-6 Metamorfozo de la salajreco en Francio (dua parto)
- 6 Leginda legendo: La antaŭuloj de la Inkaoj

Supplément en français

- 7 Louis Guilloux
- 8 «Un congrès ouvert à tous»: - parties du programme ouvert au public.
- 10 Le mot du Président
- 11 Utilaj informoj
- Kiel traduki: Face
- 12 Libro-Servo
- 13 Libro vivas pli ol unu sezono: Naskiĝo...
- 14 Kongres-gastigejoj
- 15 Ekskursoj
- 16

La fetiĉa koboldo de l' kongreso
desegnita de S. Lemarchand.



Iru ekskursi okcidenten!

Ni estas en 78 post J-C (Jacques Chirac) . La tuta Gaŭlio estas okupata de eŭropanoj parolantaj fuŝe la anglan. Tuta Gaŭlio? Ne, du vilaĝoj loĝataj de nevenkeblaj bretonoj rezistas ankoraŭ kaj ĉiam kontraŭ la potenco de la fuŝangla lingvaĉo, kaj la vivo ne estas facila por la adorantoj de la makdonalda kulturaĉo

Marde, post la SATamikara kongreso, ni proponas al vi iri kune okcidenten por malkovri la belegan marbordon konsistantan el rozkoloraj granitŝtonoj sed ankaŭ veran gaŭlan vilaĝon kaj veran esperantan vilaĝon ...

Ekskursa plano

9:00 Foriro de San-Briego per aŭtobuso
10:00: Malkovro de la duoninsulo

«Renote» en Tregastel ĉe la rozkolora granitŝtona marbordo apud Perros-Guirec

11:30: Vizitado de la gaŭla vilaĝo en Pleumeur Bodou.

12:00: Gaŭla manĝaĵo en la ĉef-kabano de la vilaĝo. La bretona magia supo estos eble trinkebla!

14:00: Veturado ĝis Pluezek tra urbeto Treguier kaj kastelo «La roche Jag»

16:00: Vizito de la muelejo Kraka en Pluezek

16:30: Malkovro de la statuoj de esperantistino Marie Eon

17:00: Manĝeto kun la urbestro de Pluezek

18:00 Aŭtobuse al San-Briego (alveno ĉ. 19:00)

Prezo: 35 € (kun manĝo)
(Pri tio , vidu ankaŭ P.16)

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
	Co
Jean-Claude et	
Hélène	Dubois
Stephane	Lemarchand
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Flora	Markov
Vito	Markovo
Guy	Martin
Rolande	Nedellec
Laurent	Peuch
Jean	Selle
Philippe	Stride
Sergo	Sir'
Juliette	Ternant
Amapola	Triguero

Provizora programo



S. 03 04 2010		D. 04 04 2010		L. 05 04 2010	
9 h 30	Akcepto de la kongresanoj (ĝis 11 h)	Kunveno SAT-Amikaro		Kunveno SAT-Amikaro	
10 h	Ekspozicio/libroservo/diskoservo Festivaletoj*/Ekzamenoj	Kongresa foto		Prezentado de la SATkongreso	
12 h 30 13 h 30	Tagmanĝo	Tagmanĝo		Tagmanĝo	(provlando Gijomo Salono Palante)
14 h	Vizito de la brikfabriko	Ekzamenoj/ Festivaletoj*		Prelego : (en la franca) «bataille de l'eau en Bretagne»	Ekskurso San-Briego
15 h		Festivaletoj*/ Prelego (en la franca) «Louis Guilloux l'insoumis»			
16 h	Ekskurso/ mitulbredado	Prelego « Ni krizkontraŭu »		provlando interkant' (salono G. Palante)	provlando « La atendejo » (Salono G.Palante)
17 h					
18 h	Oficiala malfermo de l' Kongreso kun aperitivo...				
19 h	vespermanĝo	vespermanĝo		vespermanĝo	
20 h 30	Koncerto Nokta festo (Fest-noz) Mervili (salono G. Palante)	Klasika gitaro Lino Markov (salono G. Palante)		Kanto/piano Gijomo (salono G. Palante)	
21 h		Kanto G – Interkant' (salono G. Palante)		« La atendejo » teatraĵo La Maretanoj -VANNES (salono G. Palante)	

*Festivaletoj : (esperanto/bretona rapida kurso de 45min)

M 06 04 2010
Tuttagaj ekskursoj Iru Okcidenten : 8h30/19h Iru Orienten : 9 h/17 h


EKZAMENOJ

Kiel kutime, estos proponita al la kongresanoj trapasi ekzamenojn laŭ la 2 unuaj niveloj de FEI (Franca Esperanta-Instituto).

Tiuj sesioj okazos sabate matene kaj posttagmeze en kaj proksime de la kongresejo.

Se vi deziras aliĝi al tiuj ekzamenoj, nepre kompletigu la kongresan aliĝilon kaj sendu ĝin antaŭ la 1a de marto 2010, por ke ni venigu ekzamenontojn.

Selle humuraĵo



Proceso post poluado



Metamorfozo de la salajreco en Francio

(dua parto)

La manlaboristoj perdis sian antaŭan superrangecon sekve de ĝeneraligo de salajreco, kiun oni povas nomi «burĝa» kaj rilata al la oficistoj, teknikistoj, inĝenieroj, kadrujoj, dungitoj en la terciara sektoro ktp.

La apero de la salajreca socio malhelpis, ke la laborista klaso triumfu. En la salajreca socio, ĉiu komparas sin kun ĉiuj, sed ankaŭ distingiĝas de ili, ĉar la socia skalo havas kreskantan nombron da gradoj, sur kiujn la salajrujoj kroĉas sian memecon, reliefigante la diferencon inter la ŝtupoj kaj aspirante al la superaj. La kondiĉo de la laborista klaso, en kiu troviĝas ankaŭ enmigrintoj, daŭre okupas la malsupron de la socia skalo. Jam en la jaro 1936, la Ĝenerala Laborkonfederacio (franclingve CGT) amare spertis «indiferentecon de la teknikistoj antaŭ la laborista movado».

Ĉirkaŭ la jaro 1968, analizo de la laborkonfliktoj montris, ke la propeco de teknikistoj, kadrujoj kaj inĝenieroj puŝis ilin al defendo de siaj specifaj interesoj, kiuj interalie rilatas al socia diferencigo kaj respekto al hierarkio.

Sur la kampo de la socialaj rajtoj, la ĉefa realigo estis sendube la fondo de la socia asekuro en la jaroj 1945 kaj 1946, sed la sekurigo povas esti trompaj, se ili ekskluzive baziĝas sur ekonomia kreskado. Dum la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj, la senlimtempaj laborkontraktoj (franclingve CDI) fariĝis normo kaj povis esti rigardataj kiel garantioj pri la sekureco de dungiteco. Tiu situacio fontis el la fakto, ke en periodo de kvazaŭa plena dungiteco oni multe dungas kaj malmulte maldungas. Kiam la ekonomia konjunkturo ŝanĝiĝas, tiam la sekureco de dungiteco malaperas kaj la «senlimtempa» karaktero de laborkontraktoj montriĝas simpla efekto

de rutina okazaĵo kaj ne leĝa garantio. Resume, senlimtempa laborkontrakto estas interkonsento, kiu validas... ĝis ĝi rompiĝos, krom se ekzistas speciala statuso kiel tiu de la ŝtataj funkciuloj aŭ leĝaj garantioj kontraŭ maldungoj, sed kies efiko estas limigita.

La socia ŝtato estas malstabiligita pro malfortiĝo de la nacia ŝtato, kies senpera eliĝo ĝi estas. Ĝiaj prerogativoj reduktiĝas pro disvolviĝo de la malcentralizo de decidpovoj, pro la Eŭropa Unio kaj ĉefe pro la ekonomia tutmondiĝo kaj la superpezo de la internacia financa kapitalo. De la komenco de la 1970-aj jaroj, anstataŭ ke la eŭropaj ŝtatoj venigu elmigrantajn salajrujojn, kiujn ili laborigus en siaj kondiĉoj, ili konkurencas kun geografiaj zonoj, kie la salajroj estas tre malaltaj, sur tutmondiĝinta labormerkato.

La kreskado de la senlaboreco rimarkinde komenciĝis en la jaro 1976, kiam la senlaboruloj estis en la nombro de unu miliono. De tiam la nombro da laborpetantoj kreskis kvazaŭ senĉese. Eĉ en la jaroj 1988 kaj 1989, kiam la ekonomia kreskado atingis la nombron de 4 procentoj, tiam estis 850.000 dungoj, sed la senlaboreco malkreskis nur en la nombro de 400.000 personoj. Tiuj konstatoj ne instigas kredi al la dolĉigaj diskursoj pri la ekonomia kreskado kaj la progreso.

La senlaboreco estas plej videbla manifestiĝo de profunda transformiĝo de la dungiteca konjunkturo. La senlimtempaj laborkontraktoj estis ĉe sia apogeo en la jaro 1975 kaj tiam rilatis al ĉirkaŭ 80 procentoj de la aktiva loĝantaro. Poste apartaj formoj de dungiteco disvolviĝis kaj koncernis diversajn heterogenajn situaciojn: limtempaj laborkontraktoj (franclingve

CDD), portempaj anstataŭoj (franclingve *intérim*), partatempa laboro (franclingve *travail à temps partiel*), subvenciataj dungoj (franclingve *emplois aidés*) en la kadro de la lukto kontraŭ la senlaboreco. Klare montriĝas, ke labora malcerteco kaj senlaboreco entrudiĝis en la nunan tiel nomatan «modernigan» liberalisman procezon.

Estas paradokse, ke la apologio de la kapitalistaj entreprenoj ĝuste trudiĝis, kiam ili perdis grandan parton de siaj funkcioj de socia integriĝo. Tiu apologio plifortiĝis, kiam socialistaj ministroj konvertiĝis al la efiko de la liberala merkato post la jaro 1982. Kiel ĉiuj konvertitoj ili volonte falis en prozelitismojn. La pripensado de la privataj individuoj fandiĝis en la ideoj de la ekonomia progreso, de la produktiveco kaj de kulto al la kurboj de la ekonomia kreskado. De alia flanko, la privataj individuoj, kiuj gloras la tujan hedonismojn («ĉion tuj»), esprimas rifuzon pri prokrasto de la satigo de bezonoj pli-malpli artefaritaj kaj pri la planita ekzistado, kiun postulas ŝtata organizado de la dungiteco.

En la kadro de la konkuriveco kaj rentabilitato, la entreprenoj devas primajstri la teknikajn ŝanĝiĝojn kaj submetiĝi al la merkataj postuloj. Montriĝas, ke la plej konkurivaj entreprenoj estas tre ofte ankaŭ la plej postulemaj kaj do la plej eksigemaj: publikigo de redukto de dungitaro ofte akompanas tiun de pozitivaj komercaj bilancoj.

Estas ankaŭ paradokse, ke en periodo karakterizita per denova disvolviĝo de la liberalismo kaj per glorado de la entreprenoj, la ŝtataj intervenoj neniam estis tiom multaj kaj variaj sur la kampo de la dungiteco. Tamen la kondiĉoj de

Selle plu...

Neatendita sekvo de ekonomia krizo



Nova armilo: eksplodema supozitorio



tiuj intervenoj ŝanĝiĝis kompare kun tiuj de la antaŭaj periodoj: transpaso de politikoj por socia integriĝo (franclingve *intégration*) al politikoj por alimedia enŝoviĝo (franclingve *insertion*). La politikoj por socia integriĝo havis la celon homogenigi la socion en nacia kadro: - egaleco de ĉiuj loĝantoj antaŭ la publikaj servoj kaj instruado, - redukto de la sociaj neegalecoj, - disvolvigo de la socialaj protektoj, - plifirmigo de la salajreco. La politikoj por alimedia enŝoviĝo celas apartajn homgrupojn: - loĝantojn de malriĉaj kvartaloj, - gejunulojn malsukcesintajn en sia lernanteco, - ne dungeblajn gejunulojn, - longatempajn senlaborulojn...

Sur la kampo de la socialaj protektoj, ekzistas rilato de kompletigeco inter la sociala asekuro kaj la sociala asistado. La sociala asekuro koncernas la salajrulojn, ties familion kaj ĝenerale ĉiujn, kiuj havas rilaton al la laboro. La sociala asistado fontas el la tre malnova tasko provizi per

akcesoraj monrimedoj ĉiujn personojn, kies ekzistado ne povas plenumiĝi sur la bazo de laboro aŭ propio. Fakte, kristaliĝas pli kaj pli grandnombraj kategorioj de ricevantoj de la sociala asistado, kiuj dependas de speciala reĝimo: - neadaptiĝantaj infanoj, - gemaljunuloj kun malgranda aĉetpovo, - handikapuloj, - familioj kun malgrandaj vivrimedoj aŭ kies anoj disiĝis.

En la komenco, la politikoj por alimedia enŝoviĝo havis momentan kaj improvizitan karakteron, sed ekde la jaro 1980 reaperis malnova maltrankviligo, kiu dum la jaroj da ekonomia kreskado ŝajne forviŝiĝis de la memoro: la malcertaĵoj de la salajreco.

Laŭ la opinio de iuj kapitalistoj, la plimulto de la socialaj protektoj datiĝas de forpasinta epoko, kiam socialaj kompromisoj kongruis kun la postuloj de la merkato. Tiuj kapitalistoj havas la celon redoni al la entreprenoj senlimajn

rajtojn kaj eblojn, kio estus la nova kategorio imperativo, al kiu ĉiu socio devas alkonformiĝi.

En la konfuza situacio de la salajreco oni povas aŭguri nenion bonan, kiel diris la ĉi-supre citita sociologo *Hannah Arend*: «Kio troviĝas en nia estonteco, tio estas la aspekto de socio de senlaboraj laboristoj, nome senigitaj je la nura farokapablo, kiu restas al ili. Oni povas imagi nenion pli malbonan».

Jean Selle

Nota.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la libro titolita *Les métamorphoses de la question sociale*, verkita de la sociologo *Robert Castel*, eldonita de la firmao *Fayard* en januaro 1995.

Leginda Legendo

La antaŭuloj de la inkaoj

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el kvar kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj pri eroj el la prezentitaj tekstoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

La loko de la komenco nomiĝis Pakaritambo. Apud tiu loko staris Tambo Toko, kiu estis monto. Tri fenestroj trapenetris¹ la monton. La ok antaŭuloj eliris el tiu monto tra la centra fenestro. Fakte, la ok antaŭuloj estis kvar paroj, kiuj estis geedzoj kaj gefratoj. Ili nomiĝis Ajar Manko Kapak kaj Mama Oklo, ; Ajar Aŭka kaj Mama Huako ; Ajar Kaĉi kaj Mama Ipakura ; Ajar Uĉu kaj Mama Raŭa. Ambaŭ amikaj popoloj de la inkaoj eliris el Tambo Toko tra la dekstra fenestro kaj la maldekstra fenestro.

Post ilia eliro² el la monto, Ajar Manko Kapak diris, ke li trovos bonajn terojn por siaj gefratoj kaj siaj amikoj. Li ankaŭ diris, ke li gvidos ilin al tiuj lokoj.

Ajar Manko Kapak kaj liaj postirantoj³ iris norden, al Kuzko. Li kontrolis la fruktodonecon⁴ de la tero, per magia ora stango⁵.

La gefratoj haltis multfoje. La unuan

fojon, Ajar Manko Kapak kaj Mama Oklo koncipis⁶ infanon.

La duan fojon, Mama Oklo naskis Sinĉi-n Roka-n, sian filon.

La trian fojon, la antaŭuloj staris en Palluta, kie la tero estas bona. Do ili staris tie dum multaj jaroj, sed fine la tero fariĝis nefruktodona.

Ili foriris kaj la kvara halto estis Hajsiskisro. La gefratoj serĉis fruktodonan teron sed ili ne estis la solaj homoj en la mondo. Fakte estis landanoj⁷. Sed, Ajar Kaĉi estis kruelema kontraŭ la landanoj. Tial⁸, Ajar Kaĉi embarasis la aliajn gefratojn. Ili kreis ruzon por forigi⁹ lin. Ajar Manko Kapak demandis al Ajar Kaĉi, ĉu li povas reiri centran fenestron de Tambo Toko por preni magiajn objektojn, kiel la magia ora stango. Tiuj objektoj estis figureto, ortaso¹⁰ kaj iom da speciaj grajnoj. Ajar Kaĉi iris la monton, sed li neniam revenis: kiam li eniris la monton tra la fenestro, li

restis en la monto. Li estis mallibera.

La kvinan fojon, la gefratoj trovis la valon de Kuzko. Ili suriris al monto kaj vidis la valon. Ajar Manko Kapak ĵetis la magian oran stangon en la valo de Kuzko. Tuj¹¹ aperis ĉielarko. Ili pensis ke tiu estas bona aŭguro. La valo de Kuzko fariĝis ilia lando sed Ajar Uĉu neniam iris en tiun landon. Kiam li estis sur la monto, flugiloj¹² kreskis el lia dorso. Li flugis en la ĉielo ĝis la suno. La suno diris al li, ke Ajar Manko Kapak, la plej maljuna frato estas la estro¹³, kaj ke la gefratoj devas iri al Kuzko, ĉe Alkavikca, kiu estas la lokestro¹⁴. Ajar Uĉu malsupreniris¹⁵ por ripeti la deziron de la suno al siaj gefratoj. Poste, li aliformiĝis en ŝtonon. La gefratoj iris al Kuzko, kaj renkontiĝis kun Alkavikca. Ili klarigis al li, ke ili estis senditoj de la suno. Alkavikca komprenis kaj donis la urbon al ili. La antaŭuloj alportis la sciencan de la maizkultivo¹⁶. Sur la venonta centro de la nova Kuzkurbo¹⁷ de la inkaoj, la lasta frato, Ajar Aŭka, ankaŭ aliformiĝis en ŝtonon. Finfine, Ajar Manko Kapak restis la nurnura frato.

Tiu legendo taŭgas kun la politikorganizo¹⁸ de la inkaoj dum la imperio: unu imperiestro, liaj fratinoj kaj edzinoj, kaj la nurnura heredanto.

Co.

1	trapanetri	percer
2	post ilia eliro	Après leur sortie
3	postirantoj	ceux qui suivent, les disciples
4	fruktodoneco	fertilité
5	magia ora stango	une barre magique en or
6	koncipi	concevoir
7	landanoj	habitants
8	tial	c'est pourquoi
9	forigi	éloigner, se débarrasser de (+ac)

10	ortaso	tasse en or
11	tuj	immédiatement
12	flugilo	aile
13	estro	maître
14	lokestro	maître des lieux
15	malsupreniri	descendre
16	maizkultivo	culture du maïs
17	Kuzkurbo	la ville de Kuzko
18	politikorganizo	l'organisation politique

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Numero spécial Congrès

Louis Guilloux, écrivain



Louis Guilloux
né et mort à St Brieuc (1899-1980)

D'origine modeste, son père est cordonnier, Louis Guilloux passe sa jeunesse à St Brieuc dans l'ambiance des luttes ouvrières. Il est aussi marqué par le spectacle des nombreux blessés de la 1^{ère} guerre mondiale transportés dans cette ville éloignée du front pour y être soignés.

De santé fragile, il réussit cependant à poursuivre des études au lycée et obtient un poste de surveillant qui lui procure une certaine indépendance financière. Il fait alors la connaissance de Jean Grenier et du philosophe George Palante qui lui inspirera le personnage pathétique de «Cripure» dans son roman «Le Sang Noir».

En 1918, il part pour Paris, où il vit de petits boulots précaires dont le journalisme. Il exerce plus durablement le métier de traducteur de journaux anglais et plus tard de littérature anglaise et américaine.

Il fréquente à Paris le milieu littéraire (Max Jacob, André Chamson, Jean Guéhenno, André Gide, plus tard André Malraux) et décide de se consacrer à la littérature. Il publie «La Maison du Peuple» en 1927, œuvre où il décrit la vie et les espoirs du prolétariat de Saint Brieuc (traduit en espéranto en 1999: «La domo de la popolo»).

En 1928 il part à Angers où sa femme est nommée professeur de français.

A partir des années 1930, devant la montée du fascisme, il s'engage davantage dans les activités politiques et sociales. Après son retour à St Brieuc, il prend part aux luttes paysannes des années 33-34 contre les ventes saisies des fermes et soutient activement les mouvements en faveur des chômeurs. En tant qu'intellectuel antifasciste, il devient le secrétaire du Congrès International des Ecrivains. Il s'engage ensuite dans l'organisation du Secours Rouge International qui vient en aide aux personnes fuyant les régimes fascistes et nazis.

Son chef-d'œuvre «Le Sang Noir» paraît en 1935.

En 1936, il accompagne André Gide en URSS; il refuse de prendre position contre Gide pour ses critiques du régime soviétique, malgré les pressions du Parti Communiste.

Au sein du Secours Populaire de Saint-Brieuc il organise, dès 1937, l'aide aux réfugiés espagnols évacués suite à l'avancée des troupes franquistes.

Pendant l'occupation allemande, il réside à St Brieuc et tout en rédigeant «Le Pain des rêves» il est en contact avec les réseaux locaux de résistance. (Sa maison est perquisitionnée et une jeune résistante communiste y est arrêtée par la milice française.)

A la libération il est désigné comme interprète auprès de l'armée américaine: il assiste ainsi à des procès militaires et perçoit le racisme qui y règne (thème du livre «O.K. Joe!» publié en 1975). Il fait la connaissance d'Albert Camus avec lequel il sympathise.

En 1949 paraît «Le jeu de patience» qui reçoit le prix Renaudot.

Les années suivantes, il continue à écrire et à publier, adapte des textes pour le théâtre et la télévision.

Pendant les événements de mai 68, il reste fidèle à ses engagements



en soutenant les manifestations des étudiants ainsi que les ouvriers grévistes du «Joint français».

«Les Carnets» tome 1 paraît en 1978, le tome 2 ne sera publié qu'après sa mort.

Pour en savoir plus:

<http://www.louisguilloux.com/index.php?id=0>

http://incroyablesanarchistes.org/articles/1936_45/refugie-bretagne.htm

Actualités:

Parution en 2007 chez Gallimard de «L'interprète» de l'historienne américaine Alice Kaplan sous-titré: *Dans les traces d'une cour martiale américaine (Bretagne 1944)*.

Parution le 24/09/09 chez Gallimard d'un important recueil intitulé: *D'une guerre l'autre* contenant:

La Maison du peuple (Préface d'Albert Camus)

Compagnons (Préface d'Albert Camus)

Le Sang noir (Préface d'André Malraux)

Douze balles montées en breloques

O.K. Joe!

Labyrinthe

L'Herbe d'oubli

DVD «Louis Guilloux, l'insoumis» septembre 2009

Documentaire réalisé par Rolland Savidan et Florence Mahé

<http://www.rsproductions.fr/>

Amapola et Rolande Esperantigota en la venonta revuo

Centre de Congrès Espace Palante

La nouvelle salle multifonctions est dédiée en premier lieu à la vie culturelle et associative de la commune d'Hillion. Dotée d'une scène de 120 m² et de gradins rétractables (près de 300 places), d'un patio, d'un office et d'un foyer-bar; elle peut accueillir spectacles, projections, conférences, bals, mariages, colloques d'entreprises, etc...

L'espace Palante inclut également 2 salles pour associations: *La Presqu'île* (220 places) et *Les Dunes* (90) places.



Soirées culturelles

Georges Palante – Hillion

Samedi 3 avril 2010 18h à 22h

«Mervili»

Mervili est un groupe breton de musique traditionnelle composé de quatre instrumentistes: d'une vielleuse, d'un cornemuseur et de deux violonistes. La musique de Mervili est une musique à bourdon, au son chaleureux, dynamique et riche, qui se prête aussi bien aux mélodies enjouées qu'aux complaintes.

Mervili donne à écouter des musiques essentiellement issues des nombreux terroirs de Bretagne allant du pays Gallo à la Basse Bretagne, musique à

danser ou musique à écouter.

Au cours de la première soirée de notre congrès, nous aurons le plaisir d'entendre et de participer avec Mervili:

Pendant l'ouverture officielle du congrès et l'apéritif qui s'en suivra.

Après le repas du soir, au cours d'un concert où Mervili présentera des musiques de la Renaissance (de cette époque date notre musique bretonne actuelle).

Après ce bref concert, Mervili nous invitera au «Fest noz – nokta festo». Deux des quatre musiciens nous enseigneront leurs chants et leurs pas.



Conférences-débats

Samedi 3 avril 2010 14-16 h

«Louis Guilloux l'insoumis»

Le film/documentaire «Louis Guilloux l'insoumis» a suscité une critique élogieuse dans la presse qui a souligné l'actualité de la pensée et de l'oeuvre de Louis Guilloux dans notre XXI^e siècle.

Rolland Savidan et Florence Mahé, en coproduction avec la Société des Amis de Louis Guilloux, ont enregistré les témoignages de ceux qui ont connu et côtoyé Louis Guilloux à St Brieuc aussi bien qu'à Paris. Louis Guilloux écrivain, engagé dans les luttes contre les souffrances et les injustices, ami fidèle de Max Jacob, Jean Grenier, Albert Camus, André Malraux, Jean Daniel et bien d'autres.

La projection de ce film/documentaire de 70 min sera suivie d'un débat avec la Société des Amis de Louis Guilloux.

lundi 5 avril 2010 14-16 h

La bataille de l'eau en Bretagne.

«En 1969, il n'y avait pas d'association de ce type en France. Le droit de l'environnement était pratiquement inexistant. *Eau et Rivières* a contribué à le forger» dans des affaires qui ont fait depuis jurisprudence.

Au fil des années, le rayon d'action de l'association s'est élargi. L'an dernier, en lien avec la Confédération du logement et du cadre de vie (CLCV), ses militants ont obtenu la condamnation par la cour d'appel de Lyon du géant agro-chimique américain Monsanto pour «publicité mensongère» sur le désherbant «Round Up», présenté jusqu'alors comme «biodégradable».

C'est aussi l'association qui est à l'origine du contentieux entre l'Union européenne et l'Etat français sur la pollution par les nitrates de sources

d'eau potable en Bretagne, rappelle Camille Rigaud, son président.

Son rôle de pionnière et son succès, *Eau et Rivières* les doit paradoxalement au développement agricole de la Bretagne, où la mutation brutale vers une culture intensive et ses conséquences néfastes sur l'environnement «a éveillé les consciences plus tôt qu'ailleurs» dans la lutte pour la protection de la nature, comme l'explique Gilles Huet, le délégué général de l'association.

Surtout connue pour son rôle de «contre-pouvoir», *Eau et Rivières* mène aussi «un gros travail de propositions, d'avis et de participation» dans le débat public.

Avec Gilles Huet.

Georges Palante – Hillion

Dimanche 4 avril 2009 - 20h30

Lino Markov, guitariste,

titulaire du D.E.M. et en préparation du concours au CNSM de Paris présentera en concert des pièces de guitare classique dans un répertoire relatant quelques grandes périodes musicales: baroque, renaissance et contemporaine. Des pièces, fréquemment interprétées, lors de concert de guitare classique, de Jean-Sébastien Bach, J. Dowland, F. Mompou, I. Albeniz seront présentées lors de la première partie du concert «Canto General».

Il interprétera quelques chants, composés directement en espéranto puis rejoindra l'ensemble instrumental pour accompagner le chœur Interkant' comme pianiste et guitariste.

21h30'

Interkant' et «Canto General» Pablo Neruda – Mikis Theodorakis

Le chœur interrégional «Interkant» a été créé en mai 2009 pour promouvoir la version espérantiste de Georges Lagrange du «Canto General».

Interkant' regroupe les différents chœurs espérantistes des villes ou régions (Bretagne, Normandie, Alsace, Sud-Ouest, Paris, Le Mans, Angers). Fort de 50 chanteurs, solistes et musiciens, sous la direction de Franjo Lévêque, il a avec succès, présenté cet ensemble de poèmes chantés à Bouresse dans le cadre d'un hommage à Georges Lagrange le 11 juillet 2009.

Cet oratorio de Pablo Neruda mis en musique par Mikis Theodorakis est le cri de la lutte contre toutes les formes d'oppression de l'époque des conquistadors à celle des dictateurs contemporains, c'est aussi un chant de solidarité aux opprimés, aux humiliés et aux exploités.

La musique de Theodorakis est empreinte de force, violence, douleur et tristesse au rythme des vers de son ami Pablo Neruda.



Georges Palante – Hillion

Lundi 5 avril 2010 – 20 h 30'

Gijomo

Pendant longtemps, simplement avec son piano, Gijom Armide a écrit des chansons sans les donner à entendre, jusqu'au jour de sa double rencontre avec le développement durable et l'espéranto, deux projets de société au service l'un de l'autre, selon lui. C'est alors qu'il se met à écrire de nouvelles chansons, cette fois, dans l'objectif d'une autre double rencontre, celle d'un public francophone, et d'un public espérantophone. Le premier se voit adresser des «chansons issues de l'agriculture biologique», chansons traitant des grandes problématiques sociales et écologiques de notre siècle. Le second a droit à des chansons... d'amour! Banal? Non: universel, puisqu'elles sont en espéranto! Un même chanteur pour deux publics différents! Voilà qui est propice à les réunir...

21h30'

La Maretanoj de Vannes «La atendejo»

Depuis plusieurs années le club espérantiste de Vannes, chaque semaine se retrouve pour chanter.

A l'occasion de la "Fête de Zamenhof" 2006, ils ont créé et présenté une comédie musicale en espéranto: "la gastejo de la Verda Stelo".

"La atendejo" est le deuxième spectacle de ce chœur qui se nomme "La Maretanoj". L'objectif premier de cette aventure est d'apprendre, d'enseigner et de faire connaître l'espéranto d'une manière ludique.

"La atendejo" (résumé)

Dans la salle d'attente du Docteur Zorgo, absent, les patients arrivent les uns après les autres. Tous, selon leur personnalité, essayent de passer le temps, plus ou moins avec patience, tout en bavardant, se disputant, en chantant, en faisant la fête jusqu'à ce qu'une femme, enceinte et sur le point d'accoucher, arrive. Comment faire sans médecin...?

... humour, suspense, incompréhensions multiples.....

Le mot du président du comité d'organisation du congrès

Nous avons tenu à présenter un congrès proche de nos préoccupations collectives du moment.

La crise a réellement des causes connues, elle nous oblige à des changements profonds que nous devons amorcer de suite.

Mais lesquels?

Ainsi, nous aborderons avec des spécialistes des problèmes concrets de notre environnement :

- la mortalité des abeilles et la pollution de l'eau. Ils interrogent nos pratiques quotidiennes pour produire notre alimentation. Nous savons bien qu'il faut remettre en cause notre organisation actuelle dans l'approche de la nature, mais

quelle chemin prendre?

Nous serons stimulés dans nos réflexions par:

- un débat sur la sortie de la crise, évolutions et propositions.

- le documentaire sur Louis Guilloux «l'insoumis», penseur et écrivain briochin engagé. Il a mis ses idées en action....

Et même dans le programme artistique nous trouverons des éléments de réflexions dans les textes de Gijomo et de Pablo Neruda (Canto General).

Soyez rassurés, nous avons prévu des temps de respiration au milieu de la gravité de ces débats. Des moments pour souffler et s'évader, en découvrant notre environnement

proche, Saint Briec, sa baie et notre belle région par les excursions que nous avons organisés:

- celle sur l'est se centre sur notre histoire dans le cadre d'une ville à l'intérieur des terres, Dinan, bien conservée et son environnement

- celle de l'ouest vous fera découvrir les bords de mer et des particularités locales.

Et, bien entendu, des soirées distrayantes.

Un congrès pour penser notre avenir avant que d'autres le pensent pour nous.

Pour le comité d'organisation, le président: Philippe Stride

Mini-festival des langues



Samedi 3 avril 2010 matin et après-midi

Demat ! Degemermet e Breizh – Bonjour ! Bienvenue en Bretagne –

Saluton ! Bonvenon en Bretonio

Un congrès de SAT-Amikaro est l'occasion de présenter au public local notre langue universelle « Espéranto ». Pour les congressistes, c'est également un

moyen de découvrir les cultures et particularités de la région d'accueil.

Nous aurons donc le plaisir d'organiser un mini festival de langues durant lequel les congressistes pourront s'initier au Breton, tandis que le public découvrirra l'espéranto.

Kenavo - Au revoir – Ĝis revido

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claude.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Décembre 2009.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 17a kaj duono, kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2008 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio: 3,80 F.S.; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2008 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto: Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo: Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet, Maksimiliano Gverino, Vinko Markovo

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@aliceadsl.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuaj publikoblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Retpoŝt-adreso: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Retpoŝt-adreso : claud.gerlat@orange.fr

Mireille Grosjean :Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Féés 74330 Sillingy Retpoŝt-adreso : lasago@free.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Atentu!

La redakta ret-adreso de La SAGO ŝanĝiĝis al **lasago@free.fr**

Kiel traduki Face

La franclingva vorto **face** signifas unue la antaŭan parton de la kapo de homo, **facio**, sed ĝi havas multajn aliajn sencojn, kiuj postulas diversajn tradukojn: **vizaĝo, faco, flanko, fronto, kontraŭ** kaj aliaj. Ĉi-sube estas kelkaj ekzemplaj frazoj.

- ♦ La traduko per **facio** estas uzata precipe en anatomio kaj medicino:

Les nerfs de la face. **La faciaj nervoj.**

L'angle facial. **La facia angulo.**

- ♦ La plej komuna traduko estas **vizaĝo**:

Se voiler la face. **Vuali al si la vizaĝon.**

Il a une face de carême. **Li havas palegan vizaĝon.**

Regarder quelqu'un en face. **Rigardi iun vizaĝon kontraŭ vizaĝo.**

Il le lui a dit en face. **Li diris tion al li rekte en la vizaĝon.**

Regarder la mort en face. **Rigardi al la morto en la vizaĝon.**

Ils se prosternèrent face contre terre. **Ili kliniĝis vizaĝaltere.**

Changer la face du monde. **Ŝanĝi la vizaĝon de la mondo.**

C'est un homme politique à deux faces. **Li estas duvizaĝa politikisto.**

Il a peur de perdre la face. **Li timas perdi la vizaĝon; li timas ridindiĝi**

Il a réussi à sauver la face. **Li sukcesis savi sian vizaĝon; li sukcesis savi sian dignon.**

Sors d'ici, espèce de face de rat ! **For de ĉi tie, vi, ratovizaĝulo !**

- ♦ En geometrio oni tradukas **face** per **facio** aŭ per **edro**:

Un cube a six faces. **Kubo havas ses facojn.**

Un tétraèdre a quatre faces. **Kvaredro havas kvar facojn.**

- ♦ En kelkaj okazoj **face** signifas **flankon**, en propra aŭ figura senco:

Faire l'ascension de la face nord **Suprengrimpi la nordan flankon de d'une montagne. monto.**

Une affaire qui présente plusieurs faces. **Afero, kiu posedas plurajn flankojn.**

- ♦ Kiam **face** signifas la antaŭan parton de objekto aŭ la situon kontraŭ io alia, la traduko uzas jen la nomon **fronto**, jen la prepozicion **kontraŭ**, aŭ iliajn derivaĵojn, jen tute aliajn vortojn:

La face, ou avers, d'une médaille est **La fronto, aŭ averso, de medalo le côté qui porte une figure. estas la flanko, sur kiu estas prezentita vizaĝo.**

Jouer la question à pile ou face. **Veti la aferon je fronto aŭ dorso (de medalo).**

Cet hôtel fait face à la mer. **La hotelo frontas kontraŭ la maro.**

Il faut faire face. **Necesas fronti.**

A
B
C
D
E
F
G
H
I
J
K
L
M
N
O
P
Q
R
S
T
U
V
W
X
Y
Z





LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro LibroServo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40 % ĝis 5€
 35 % ĝis 10€
 25 % ĝis 20€
 20 % ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

A
B
C
D
E
F
G
H
I
J
K
L
M
N
O
P
Q
R
S
T
U
V
W
X
Y
Z

Nous nous trouvons face à un vrai problème. **Ni estas fronte al vera problemo.**
 Face au danger, il recule. **Fronte al la danĝero, li retroiris.**
 Des portraits de face et de profil. **Fronta kaj profila portretoj.**
 Dessinez-moi une vue de face de cette machine. **Desegnu por mi frontan vidajon de tiu maŝino.**
 Voir quelqu'un de face. **Vidi iun fronte.**
 Une loge de face, au théâtre. **Fronta loĝio, en teatro.**
 Ils sont assis l'un en face de l'autre. **Ili sidas unu kontraŭ la alia.**
 Restons face à face. **Ni restu vidalvide.**
 Il faut voir les choses en face. **Necesas vidi la aferon tia, kia ĝi estas.**
 Il a fait cela à la face du monde. **Li faris tion vidate de la mondo.**
 Faire face à ses engagements. **Plenumi siajn promesojn.**

♦ Ni konsideru nun tri franclingvajn kunmetitajn vortojn, entenantajn la nomon **face**:

Un **face-à-face** entre deux candidats. **Duopa debato inter du kandidatoj.**
 Un face-à-face tendu entre les manifestants et la police. **Streĉita interrigardo inter la manifestantoj kaj la polico.**
 Un **face-à-main**. **Mantenaj okulvitroj, mannazumo.**
 Faire **volte-face**. **Subite returniĝi.**

♦ La homofono **fasce**, kiu signifas **strion**, estas uzata en arkitekturo kaj en heraldiko, kie ĝi tradukiĝas per fakaj terminoj:

L'architrave de ce monument est composée d'une triple fasce. **La arkitravo de tiu monumento konsistas el tri plataj modluoj**
 Le blason ci-dessous se lit ainsi: **La ĉi-suban blazonon oni legas tiel: El oro, kun trabo el lazuro, surmetita de du leopardoj interfrontantaj el arĝento.**
 (en héraldique le lion devient «léopard» quand sa tête se présente de face) **(en heraldiko, leono iĝas «leopardo» kiam ties kapo prezentiĝas fronte)**

Andreo Andrio



Plu Meven -

Ondumoj tra la mond'

(VKKD71 : ref.
 Vinilkosmo-
 katalogo)



Meven -
 Francio

Produktita de Bretona Esperanto-Koruso 2004

KD 15 titoloj -
 41:35 mn

Estas la unua KD (vkkd43) aperinta en 2001, titolita Meven, kiu hodiaŭ donas sian novan nomon al tiu voĉa ensemblo, konsistanta



el bretonoj ĉiuĝaj kaj el diversaj horizontoj, **esperantistoj** konfirmitaj ĉu kiuj celas tion atingi, kaj kiuj prezentiĝis antaŭe sub la nomo de Bretona Esperanto-Koruso.

Ofte partoprenante, de 1996, en diversaj kongresoj, kursaroj, kaj internaciaj festivaloj, kiel ekzemple tiu de Maristaj Kantoj de Paimpol en 2003, Meven esprimas sian vojaĝemon kaj interŝanĝemon invitante nin al navigado sur la maroj de la tuta mondo kaj danci je ritmoj de tradiciaj instrumentoj kiaj violono, bekfluto, aŭ akordiono, kiu venas subteni la keltecan sonoroon de la ensemblo.

Se, tamen, la membroj de Meven kuniĝas pro esperanto kaj la plezuro kunkanti sub la gvido de la taktobastono de Franjo Provost, esperantista ĥorestrino kaj profesoro pri muziko, estas la deziro krei ponton inter lirika kulturo bretona kaj la universala esenco de esperanto kiu transdonas ĉiun originalecon kaj forton de ilia klopodo.

Konsumenda kun bona glaso da medo !

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato

Harry Harrison,

eld. Sezonoj, 1996, 222 paĝoj.

Jen kion skribis Jopetro Danvy pri tiu libro en LKK-80 de 1996:

«Harry Harrison estas konata anglalingva sciencfikcia aŭtoro de pluraj dekoj da libroj, kaj pri lia biografio mi ne intencas paroli ĉi tie. Tio supozeble plenigus plurajn paĝojn. Inter lia abunda romanaro troviĝas du furoraj serioj plurlibraj «Bill, la galaksia heroo», kaj «La Rustimuna Ŝtalrato».

En ĉi tiu lasta serio, Harry Harrison, cetere esperantisto kaj mi-ne-plu-scias-kion de UEA, propagandas Esperanton, per plena paĝo fine

de la libro, kaj ofte interne, tute normale sub la formo de Universala Kosma lingvo por unuaj kontaktoj (kompreneble, tio tute perdiĝas en Esperanto-traduko!).

Pluraj verketoj de Harry Harrison jam disponeblas en Esperanto, kaj nun kun plezuro plena romano. En tiu epizodo, naskiĝas do la Rustimuna Ŝtalrato. James Bolivar diGriz (la R.Ŝ) estas iaspeca humurplena galaksia «Arsène Lupin», kiu krimas sub diversaj identecoj (Pardonu, kiel dirite en la libro «Ni ne estas krimuloj, ni estas Civitanoj de la Ekstero»). Ĉi-epizode, li renkontas mentoron «La kuriero», kaj alfrontas mezepokan

socion sur planedo «spukavatem». Mi ne malkaŝos pli.

Alia interesa afero pri tiu libro estas, ke ĝin tradukis 9 homoj, diversnaciaj, ene de interreto. Nova kunlabora sistemo, nova tekniko, kiuj ŝajne ebligas al homoj disaj bone samtaksi.

La traduko estas kohera, kvankam stile iom peza. Kelkaj «babiruŝaj» vortoj iom surprizas (pankampionŝtelistoj, kaj la nevole plursignifa «pensekskurso», ekzemple).

Resume, distra libro, kiu pro la aŭtoro kaj la tradukmetodo fariĝis ja mejloŝtona.»

Bedaŭrinde tiun ĉi libron mi ne vidis en la Katalogo 2009 de SAT-Amikaro, nek cetere en tiu de esperanto-France... sed nur en la esperanto-katalogo de UEA de 2001, kie la prezo estis tiam 12,90 €.

Kompreneble, mi ŝatintus paroli pri bretonaj libroj, ekzemple pri

«La domo de la popolo» de Louis Guilloux, sed ĉar tiun libron mi ne legis mi, kaj vi cetere, devos ĝin aĉeti en Hiliono! Mia bretona trezoro estas malnova Geriadurig Esperantek-Brezonek (Esperanto-Bretona vortareto) de 1930, kiu tranvile staras sur iu «astell» aŭ

«plankenig», t.e. breto! Nun se vi volas lerni la bretonan trovu alian profesoron ol mi...

Sed jen ekstrakto de la Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato: Jim diGriz, 17-jara elektas iri malliberejen por lerni krimadon:

Mia hararo estis fortondita. Mi estis trabanita en antisepa ŝprucado. Malliberejaj vestoj kaj botoj estis donitaj, tiel mallerte, ke mi havis abundan tempon por transmeti miajn dirkon kaj monokolekton. Oni faris fingropremaĵojn kaj retinofotojn, kaj kondukis min al mia ĉelo. Por konstati kun granda ĝojo, ke mi havis kunĉelanon. Mia edukado finfine povis komenciĝi. Jen la unua tago de la resto de mia krimvivo.

– Bonan posttagmezon, sinjoro, – mi diris. – Mia nomo estas Jim diGriz.

Li alrigardis min kaj minacis.

– Malaperu, knabo. – Li rekomencis purigi siajn piedfingrojn, agadon, kiun mia eniro estis interrompinta.

Tio estis mia unua leciono. La

ĝentilaj parolinterŝanĝoj de la ekstera mondo ne validas malantaŭ tiuj muroj. La vivo estas akra, kaj tiaj estas la vortoj. Mi tordis miajn lipojn al rikano kaj reekparolis. Multe pli akre tiun fojon.

– Malaperu mem, piedfromaĝo. Mi ‘stas Jim. Kiu vi ‘stas?

Mi ne estis certa pri la jargono; mi estis lerninta ĝin el malnovaj televidaĵoj, sed mi ja havis la ĝustan voĉtonon, ĉar mi sukcesis kapti lian atenton tiufoje. Li suprenrigardis al mi malrapide, kaj glacia malamego brilis en liaj okuloj.

– Neniu, ja neniu alparolas Vilĉjon la Klingon tiel. Mi tranĉos vin, knabo, tranĉos vin aĉe. Mi ĉizos mian komencliteron sur vian vizaĝon. W de Vilĉjo.

– V, – mi diris. – Vilĉjo komenciĝas

per V.

Tio malpacigis lin eĉ pli.

– Mi kapablas literumi, mi ne ‘stas idioto! – Li estis brulanta pro kolerego, furioze serĉante sub sia matraco. Li eltiris segilklingon kun videble bone akrigita dorsa rando. Mortiga armileto. Li saltigis ĝin en sia mano, rikanis lastan fojon, kaj plonĝis al mi.

Kompreneble, tiel oni ne atakas Nigran Zonon. Mi flankenpaŝis, frapis lian manradikon, kiam li paŝis preter mi, kaj piedbatis la malantaŭon de lia maleolo, tiel ke li kunplonĝis kap-al-mure.

Li restis senkonscia. Kiam li rekonsciiĝis, mi sidis sur mia lito kaj purigis miajn ungojn per lia tranĉilo.

Do, antaŭ ol eniri malliberejon, lernu ĵudoon, kies «morala valoro estas, ke ĝi prezentas rimedon de senarmila sindefendo kontraŭ perforto» (fidu PIV-on!)

Ĵak Le Puil



Amasloĝejoj

Ni rezervis 135 litlokojn en du kolektivaj gastigejoj, OKK mem zorgos pri distribuo al la unuaj aliĝontoj.

- « Auberge de jeunesse » San-Briego

En bretona kaj dekkvin jarcenta biendomo, staranta proksime de vasta kaj natura valo, afable vi tranoktos en junulargastejo « Auberge de jeunesse ». Ĉarma loĝejo por ĝui, malkovri la San Briegan golfeton kie laŭsezono vivas pli ol kvindek mil marbirdojn. Atentigo do al ornitologiemuloj kiuj povos observi pli ol 120 diversajn specojn promenante laŭlonge de multaj migraj padoj.

Al kongresanoj, kiuj trajnos, ni unue atribuos tiujn loĝejon, kiu situas ĉirkaŭ 7 kilometroj for de Hiliono.

120 litlokoj; alireblaj dormĉambroj por handicapuloj.

Matene kaj vespere buso-servo ekzistos ĝis la kongresejo en Hiliono je la taŭgaj horoj.

-Kuŝloko en bieno « ridmevoj » (« mouettes rieuses »)

En ĉarma privata gastejo, ĉirkaŭ 3 km for de la kongresejo kaj proksime de la maro, 15 litlokoj. Alireblaj unuaĉambroj por handicapuloj.


St Briec (San-Briego) : 11 kilometroj

Marbordo kaj pado : 5 minutoj piede



kongresejo

por alkutimiĝi....



Hoteloj kaj tendejoj

Se vi ne deziras liton en la du rezervitaj amasloĝejoj aŭ se vi ne deziras inkluzivitan matenmanĝon aŭ se ne plu restas libera loko en ili, ni mencias kelkajn proksimajn eblecojn por tranokti, kiujn vi mem rezervas.

Hoteloj (ĉirkaŭ 7 km)

Hôtel Formule 1 – La Hazaie – Tregueux – 08.91.70.53.76

retadreso: h2445-re@accor.com

Hôtel B & B - La Hazaie – Tregueux – 08.92.78.80.93

Hôtel 1ère classe – 61 rue A. Colas – Tregueux – 08.92.70.71.49

Hôtel 1ère classe – 14 rue A. Colas – Tregueux – 02.96.33.41.60

Hôtel Kyriad – 8 rue A. Colas – Tregueux – 02.96.52.04.77

Etap Hôtel – aire de repos RN 12 – Roche Tourelle – Yffiniac – 08.92.68.40.27

Hôtel Ibis – Roche Tourelle – Yffiniac – 02.96.72.64.10

Tendejoj

1) Camping de Bonabry 22120 Hillion à 2 km du centre.

Réservations: 06.07.87.35.21 ou 02.96.32.22.15. Site internet: www.bonabry.info

retadreso: camping.bonabry@gmail.com.

2) Camping Bellevue-mer, La Pointe des Guettes 22120 Hillion à 2 km 500 du centre.

Réservation: 02.96.32.20.39 . Site internet: www.bellevuemer.com.

retadreso: contact@bellevuemer.com.

3) Camping des Vallées , Bd Paul Doumer 22000 St Briec à 8 km environ d'HILLION. Réservation: 02.96.94.05.05. Site internet: www.mairie-saint-briec.fr.

retadreso: campingdesvallees@wanadoo.fr

kaj eĉ:

Eblos parki domveturilojn apud la kongresejo en trankvila kvartalo.

Duon-tagaj ekskursoj

Malkovro de industria hereda posedaĵo kaj loka historio

Gvidata vizito de la Brikejo

Funde de la golfeto, staras ekomuzeo, memorejo de la homoj de la golfeto de San-Briego. Malkovru, kiel la loĝantoj sciis, dank' al persista inĝenieco kaj kuraĝo, ekspluati naturajn riĉaĵojn ofertajn de la golfeto, por tie vivi kaj disvolvi prosperan ekonomion

Rdv: Brikejo (*Langueux les Grèves*)

Dauro: 1h30/2h

Dato: sabaton 3an de aprilo 2010, 14-16a

Prezo: 8 €

Mitulbredado en la golfeto de San-Briego:

Aparta horaro 16 h (depende de la tajdo)

Eta promonado tra la golfeto kaj mitulfostoj por ĉion kompreni pri mitulbredado. De naskiĝo ĝis teler malkovru tiun metion duon-agrikulturistan, duon-maristan.

Promonado de 3 ĝis 4 km tra la strando.

Dato: sabaton 3an de aprilo 2010

Horo: 16-18a

Prezo: 8 €

(Antaŭvidi taŭgan vestaron)

Vizito de San Briego

(kunlabore kun la turisma oficejo de San-Briego)

Ni proponas al vi tempan retroiron vagante tra la malnovaj kvartaloj de la san-briega urbo. De la fortresa katedralo ĝis la haveno de L'égué, pasante tra la stratetoj bordataj de trabfakaj domoj, la parko de Rohannech kaj ĝia vidloko sur la golfeto de L'égué, nur lasu San-Briegon rakonti sin.

Lundon la 5an de aprilo 2010 je 15-17a - 6 €.



Malkovro de nacia protektejo de San-Briego

Klasita kiel kvina golfeto tra la mondo pro amplitudo de ĝiaj tajdoj, la golfeto de San-Briego enhavas, funde de la golfeto, la plej vastan rezervejon de Bretonio.

Riĉa je pli ol 40 000 birdoj vintre, tiu protekta vastejo nepre estas malkovrota.

Irvojoj estos proponitaj por kviete

malkovri grandiozajn riĉaĵojn de tiu unika natura hereda posedaĵo.

Pado de la duoninsulo (sole farota)

Supre de la pado de la doganistoj, malkovru la protektejon, irante de anso al alia. Variemaj kaj kontrastaj pejzaĝoj, faŭno, flaŭro kaj mitulpalisoj intermiksiĝas.

Piedmigrado de 4 ĝis 8 km, daŭro: 3 h, senpaga.

(Antaŭvidi taŭgan veston)

Orienta tuttaga ekskurso

Iru ekskursi orienten!

**Mardon la 6an de aprilo 2010
9h ĝis 17H**

Kavaliroj, monaĥoj, ... kaj vi!

Sur la spuroj de la Mezepoko tra *Dinan* kaj *Léhon*.

9:00 foriro de San-Briego per aŭtobuso

10:00 *Dinan*

pedira* vizito de la urbo komentata esperante ekstero de la mezepoka kastelo, remparoj kaj defendoturoj la placo *Bertrand du Guesclin*, franc-konestablo en la centjara milito

la trabfakaj domoj en la urbocentro kaj la horloĝturo la placo *Saint Sauveur* kun la preĝejo kaj ties historio la angla ĝardeno kun belega

vido super la riveron *Rance* la strato *Jerzual*, kiu kunligas la urbon kun la haveneto aŭtobuse al la manĝejo

12:30 manĝo ĉe *Les Pifaudais* en *Quévert*

14:00 *Léhon*

la abatejo *Saint Magloire* fondita en la 9-a jarcento

la kastelo de la 11-a jarcento piedirado laŭ la rivero *Rance* (3 km) ĝis la haveneto de *Dinan* (se necese, eblos iri aŭtobuse)

16:00 aŭtobuse al San-Briego (alveno ĉ. 17:00)

Prezo: 30 € (kun manĝo)

Pli detale vidu «La Sago»-n N° 59

*Facila surpavima piedirado, sur ebena aŭ malsuprendekliva.



Okcidenta tuttaga ekskurso

ARMOR 2010

Iru okcidenten ĉe la gaŭloj!

Ĉu vi konas Asterikson kaj Obelikson? Kompreneble Jes! Tiuj amuzaj kaj batalemaj gaŭloj estas konataj de ĉiuj. Sed ĉu vi rigardis kie lokiĝas ilia eta vilaĝo? Spektu atente la mapon: estas ĉe ni apud la Armorika marbordo...



Mia edzino Hélène kaj mi estas ankaŭ veraj gaŭloj ekde 20 jaroj. Fakte, ni estas de tiu tempo volontuloj en asocio kiu nomiĝas «la gaŭla vilaĝo» kaj zorgas pri tre bela sed nekonata gaŭla vilaĝo kreita 24 jarojn antaŭe.



Tiu loko estas turisma parko kie ĉiuj familianoj de la tuta mondo ŝatas ludi kune kaj malkovri samtempe la vivon de



niaj gaŭlaj prauloj. Sed estas ankaŭ asocio kiu helpas ĉiujare pagi la instruistojn de ĝangalaj lernejoj en Nord-Togolando.

Dum la SAT-amikara Kongreso Armor 2010, marde, ni plezure ĉiĉeronos vin Okcidenten de nia departemento. Tie estas la marbordo tre bela kun egaj rozkoloraj ŝtonamasoj. Ni vizitos unue piede la duoninsulon «ile Renote» en Tregastel. Tiu natura loko estas mirinda miksaĵo inter maro, rokoj kaj arboj. Kiam

oni pripensis lokon por nia gaŭla vilaĝo, oni elektis unue lokon kiel tiu.

Sed poste, la vera elektita loko kie la vilaĝo estis konstruita, estis *Cosmopolis* kion ni vizitos tuj poste. En *Pleumeur Bodou* lokiĝas la scienca parko *Cosmopolis* kie oni povas spekti inter arboj strangan blankan globegon «*le radome*» kiu ebligis je la 1960a jaro televidumi tra-space kun usonanoj. Nun tiu Globo estas historia monumento sed ĝi estas por ni la bretonaj gaŭloj bela luneto lokita en nia kamparo. Oni nomas tiun globegon «*Radum*» rilate al niaj maljunaj romiaj amikoj.



Do, apud tiu konata luneto lokiĝas nia gaŭla vilaĝo kiun mi plezure montros al vi. La vilaĝo estas belega kun lageto kie anasoj kaj anseroj ĉiam banas sin. La domoj estas argile konstruitaj kun kanaj tegmentoj kiel la veraj gaŭlaj domoj sed ankaŭ kiel la domoj de niaj afrikaj amikoj en Togolando. Ĉiujare, ĉirkaŭ 60 000 vizitantoj partoprenas en la diversaj proponataj agadoj kaj ebligas al ni perlabori multan monon por helpi en Afriko.



Ni tagmeze manĝos tie gaŭlan manĝaĵon antaŭ ol veturi ĝis alia vilaĝo tre konata de la esperanta mondo: *Pluezek*! Tie

okazas bretona miraklo ekde 12 jaroj: La internaciaj esperantaj renkontoj de *Pluezek* kun pli ol 120 partoprenantoj kiuj ĉiujare gustumas la veran ĉarmon de bretona somero. *Pluezek* estas vilaĝo apud *Paimpol* kie ni vizitos esperante tre belan muelejon «*Kraka*» kun mirega vidaĵo ĝis insuleto *Brehat*. Tuj poste, ni kune teumos en la ĝardeno de *Marie Eon*, esperanta talenta skulptistino. Ne forgesu vian fotilon ĉar tie vi povos foti belegajn skulptaĵojn kaj eĉ veran bretonan «*Ankou*» el la maro....



Esperanto estas ŝlosilo por gustumi novan landon kaj lokon. Tion ni celas por vi!



J.C. Dubois
marbordo@gmail.com
Pluezekaj renkontoj - www.pluezek-esperanto.net
Gaŭla vilaĝo - levillagegaulois.free.fr

